



EKO 2016-6 sendita el Katmanduo la 27an de februaro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Junuloj, novuloj, pioniroj kune en Katmanduo

La bunta kaj tumulta strata vivo de la malnova urbo en Katmanduo pentris la fonon por la dudeka seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). Tridek kvin da partoprenantoj formis malkutime grandan publikon por AMO seminario. El tiuj, 25 estis nepalanoj el ĉiaj aĝgrupoj kaj el diversaj partoj de la lando, kun la ceteraj el Japanio, Ĉinio, Germanio, Hungario kaj Pollando. La komenctaga programo disvolviĝis en la eleganta banked/kunsid-salono de la Hotelo Marshyangi. Inaŭgurita estis sametempem la 2a Speciala Ekskurso, kiu daŭros dek tagojn, kaj la seminario de AMO, kiu daŭros tri tagojn. Post unujara paŭzo, AMO revenas al Azio.

Post bonvenigaj vortoj de la prezidanto de NespA, s-ino Indu Devi Thapaliya, la vic-prezidanto de UEA ricevis la honoron malfermi ambaŭ aranĝojn per lumigo de flamo en ornamita lanterno. Sekvis skizo pri la programo de AMO – ĝiaj celoj, ecoj kaj historio. Post tio ambaŭ aranĝojn salutis landaj reprezentantoj kaj regionaj reprezentantoj el Nepalo kune kun saluto de la nepala junularo. Preskaŭ triono de la seminarianoj apartenas al tiu junulara movado. Sur la foto, la du esperantlingvaj gvidantoj kun la seminaria junularo.



La unua prezentaĵo estas de Huang Yinbao el Ĉinio, pli bone konata kiel Trezoro kun temo Elekti taŭgan metodon por uzo de Esperanto. Li emfazis nesufiĉan parolkapablon inter multaj esperantistoj kaj meditis, kiel bonigi la kapablojn. Parto de la solvo povas kuŝi en konvinka mortivigo; do li invitis respondojn de la publiko, reage al la demando, "Kial hmoj lernu Esperanton." La rikolto estis riĉa, kaj pluraj el tiuj motivoj postulus bonan parolkapablon. Li donis abundajn verbe esprimitajn agojn, kiuj povos temi pri peresperanta aŭ poresperanta agado. Citante el propra sperto, li esploris la malfacilaĵojn por izolitaj esperantistoj akiri praktikan sperton uzi la lingvon. Malhelpas tion la ofta prefero de samlandaj esperantistoj paroli nacilingve inter si. Trezoro argumentis kontraŭ tiu praktiko, ĉar tiel la koncernatoj malrapide progresas kaj malhavigas al tiuj, kiuj deziras parolpraktikon la eblon ĝin atingi.

Li rakontis proprajn spertojn krei ŝancojn por konigi Esperanton vaste, kaj ankaŭ per organizado de transnaciaj eventoj, kiel la Orientazia E-Seminario, kie la specifa celo estas paroligi la partoprenantojn. Venis fine multaj demandoj kaj debato, interalie pri la historia kaj nuntempa rolo de la sanskrita lingvo.

Jen grupfoto farita fine de la unua tago.



Post tepaŭzo, sekvis anglalingva prelego de s-ro Bishal Khanai el la Jura Universitato de Katmanduo, kun temo pri lingvaj homaj rajtoj. Li skizis la historion de homaj rajtoj, nocio ducentjara, kaj specife pri lingvaj homaj rajtoj, kiuj ricevis formalan rekonon per dokumento nur en 1996. Gravas rajtoj por minoritatoj, kaj la rajto de homoj uzi sian gepatran lingvon kaj aliri edukadon tiulingve, kaj ĝui ĝian rekonon en juraj kaj administraj sferoj. Lingva daŭripovo simile gravas, kun kontinua pereado de lingvoj kun nemultaj parolantoj. Li skizis la lingvan situacion en deko da plurlingvaj landoj, tra Azio kaj la mondo. Venis kelkaj demandoj pri la lingvoj uzitaj internacie tra la jaroj, ene de la respondoj li deklaris, ke li pretas rigardi pli proksimen en la eblecojn kaj valoron de Esperanto por internacia komunikado.

La lasta prezentaĵo de la tago venis de Stefan MacGill, kiu elektis la temon 'Kiel efike instrui Esperanton al Azianoj'. Li donis plurajn pedagogiajn konsilojn, pri la graveco ricevi en kurso bonkvalitajn kaj variajn ekzemplojn pri bona parolado kaj kantado, cele al kiel eble plej frua paroligo, ene de bone klarigitaj taskoj, en sekursenta etoso. Azianoj ĝenerale sentas plian malfacilaĵon lerni Esperanton, do indas esplori manierojn mildigi tiujn ekstreajn obstaklojn, kaj

eĉ ekspluati la aziecajn elementojn en la strukturo de Esperanto. La alkrôĉita dokumento resumas la konsilajn punktojn de la alparolo. Plia temo estis la dezirindeco de grupa kaj para laboro, por altigi la nombron de aktivaj parolantoj kaj variigi la lecionojn, kaj malaltigi la sojlon de timo ekparoli. La seminarianoj praktike tion spertis, kiam ili disiris en kvin grupojn, ĉiu kun temo por diskuti. Fermis la tagon parola reraĵo el ĉiu grupo, kune kun la transdono de skribitaj notoj. Unu el tiuj raportantoj eklernis la lingvon antaŭ nur tri monatoj, kaj tamen konvinke plenumis la taskon.

La seminariaj tagoj post la unua okazos en pli etaj salonoj kun malpli da partoprenantoj ĉar en Nepalo sabato estas la libera tago, kio permesas al multaj nepalanoj partopreni nur unutage.

690 vortoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Por vidi pli malnovajn komunikadojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

EKO 6 feb 27 Nepalo unua tago.doc

La fotoj: Pradip Ghimire